FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B.P. 54 49150 BAUGE
Peranto: IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

===== la N°: 4 F. Abono: 15 F. Kotizo: 5 F. Sume: 20 F. =====

++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

++

==== N° 136 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== MARTO 1983 ====

++

BILETO DE LA PREZIDANTO

Au momeht où vous lirez ces lignes, la semaine consacrée à l' oecuménisme sera déjà lointaine. Mais celle-ci n' est qu' un rappel de ce qui doit être une des préoccupations majeures de toute la chrétienté: la marche vers l' Unité, c' est-à-dire, à travers la diversité des confessions, la recherche d' une communion en tout ce qui peut nous rassembler; et tout d' abord, la foi dans le Verbe incarné et un regard fraternel sur le prochain dans l' amour du créateur.

En 1905, quand l' abbé Peltier, au premier congrès d' Esperanto, à Boulogne-sur-Mer, prit l' initiative d' un appel à l' union des chrétiens par l' Esperanto, il était déjà un précurseur du mouvement qui se développe surtout depuis les gestes de Jean XXIII. On sait qu' il entretint des correspondances avec des protestants et des orthodoxes, et qu' il avait inclus, dans les objectifs de la revue "Espero Katolika" une place importante à ces rapports.

Il est remarquable que, maintenant, des rencontres de prière, de lecture des livres saints entre chrétiens divers ont lieu dans le respect de l' identité de chacun, et que des réunions espérantistes permettent aussi qu' elles aient lieu sur le plan international.

Ce sont sans doute de tout petits pas, mais il n' est rien de vain quand progresse quelque part au monde, l' esprit d' amour et de paix, dans une découverte réciproque de richesses désormais partagées.

L' oecuménisme ne doit pas être synchrétisme, mais dans la diversité garder un caractère respectueux des attitudes, des traditions des uns et des autres, tenant compte des sensibilités diverses dans l' expression différente de la foi commune.

L' expérience a démontré au cours de multiples rencontres, que l' unité de langage apporte un élément puissant de rapprochement et de tolérance entre ceux qui y participent.

C. Papiers de Presse n° 62 532

../...

Nous formons le voeu que I.K.U.E., dont les instances sont plutôt tournées vers les autorités romaines pour la reconnaissance de notre mouvement et l'approbation des textes liturgiques, ce qui est nécessaire, fassent une place de plus en plus grande aux contacts avec les Eglises diverses, elles aussi préoccupées par la même recherche, avec le secours de l' Esprit-Saint, de l' Unité de ceux qui se réclament de l' Evangile et de la Révélation.

R. Cl. COLAS

<u>Al niaj eksterlandaj legantoj</u>

La kristanaj Eklezioj forgesis dum jarcentoj la vortojn de Jesuo: "Patro, ili estu unu same kiel Vi kaj Mi estas unu." (Jh. 17, 22) La kristanoj disiĝis en multajn Ekleziojn, pro multaj historiaj, kulturaj, politikaj kaŭzoj.

En nia tempo alvenas granda deziro de reunuiĝo inter la diversaj partoj de la kristana homaro. Jam en 1905, dum la unua kongreso en Bulonjo, Pastro Emile Peltier lanĉis solenan alvokon al pastroj kaj anoj de ĉiuj religioj, ke ili "per Esperanto unuiĝu por kune labori al la universala frateco"; kaj tiu apostolo de la katolika esperantismo, kiel direktoro de la ĵus naskita revuo Espero Katolika proponis al religiaj esperantistoj kelkajn paĝojn en ĉiu kajero; li mem korespondadis kun aliaj, ĉu protestantaj, ĉu ortodoksaj pastroj.

Nun, la nuna estraro de I.K.U.E. rigardas la romajn instancojn, strebante al la oficiala akcepto de nia movado kaj al la necesega aprobo de la tradukoj de tekstoj, ĉu liturgiaj ĉu bibliaj.

Sed estus ankaŭ necese fari el la revuo Espero Katolika la informilon kaj ligilon inter la kristanoj, informante pri la gravaj eventoj de ĉiuj partoj de la tero, kie vivas kaj agadas tiuj kiuj volas esti disĉiploj de Kristo.

La klopodoj por la Unuiĝo efektiviĝos, kiam, kun la dia helpo, la diversaj konfesioj estos liberigitaj de la kompromiso kun la materiaj, politikaj interesoj, kaj kiam la kristanoj iros renkonte al la aliaj en plena karitata spirito, por atesti antaŭ la rigardo de la Mondo la signifon de la kristana doktrino por la tuta homaro.

La uzado de la helplingvo en grava katolika revuo povas helpi kaj akceli la paŝojn al la veno de la vera regno de Dio.

R. Cl. COLAS

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

POPOLO DE L' UNIVERSO

Homoj! Homoj disvastigitaj ĝis nevidebleco,
naskitaj por la laboro, la batalo,
la sango kaj la revoj;

Amantoj, manĝemuloj, drinkemuloj,
laboristoj, vaguloj, batalantoj, ludantoj, spekulantoj;

Metalurgiistoj, pontistoj, muzikistoj,
putistoj, ministoj,
konstruistoj de kabanoj kaj nubskrapuloj,
ĉasistoj en la ĝangalo, bienuloj kaj eksproprietigitoj,
amataj de amo aŭ forlasitaj de ĉiuj,
krudaj kaj anĝelaj;

Vi estas unu sola granda familio lokigita sur la terglobo de la vivo ĝis la morto.
Ho, kiel la vojo estis longdaŭra
depost la praa homa familio ĝis la nia,
kies spektaklo estas tiel multe mirindega.

Carl Sandburg

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO DE LA 21-a de novembro 1982.

Ĉeestas: P. Bourdon kaj Degrelle, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Preux, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue, Lecocq kaj Villeneuve.
Observas: S-inoj Casey kaj Depecker.

14.00: malfermo per preĝo kaj kanto "Sur la sojl' de sia Dom'" memore al S-roj Kraemer kaj Olivaux forpasintaj antaŭ nelonge.
Aprobo de la tagordo kaj de la raporto pri la lasta kunsido.
Lourdes: la pilgrimo okazos de la 5-a ĝis la 12-a de aprilo. Programo kaj aliĝilo en n° 134 de FKE. Temo: Espero en Kristo kaj Lia patrino.
Tombo de P. Peltier: G. Preux legas leteron de la urbestro en Tours, kiu opinias, ke ne plu estas heredintoj en Tours. Ni fondas asocion E. Peltier por ricevi monon por renovigi lian tombon. Oni sendu al P. Degrelle.

Tombo de P. Peltier: G. Preux legas leteron de la Tours-a urbestro, kiu opinias, ke ne plu estas heredintoj en Tours. Ni fondas asocion E. Peltier por ricevi monon por renovigi lian tombon. Oni sendu al P. Degrelle.
Ĝenerala kunveno de FKEA: ĝi okazos sabaton, la 9-an de aprilo en Lourdes. Finis sian mandaton kiel komitatanoj: G-roj Lafargue, Michau, Preux kaj Vincent.
Spiritaj ekzercoj en Nancy: de la 4-a ĝis la 6-a de junio. Temo: la Evangelio laŭ S-ta Johano. Prelegoj, diskutoj kaj agaddecidoj por la estonto.
Banneux: 10/11-an de septembro 1983, jaro de la 50-a datreveno de la aperoj.
S-ta Francisko-kunuloj: internacia pilgrimo apud Namur (21/29-a de julio) Temo: la povo en kaj ekster la Eklezio.
Bulteno: bone tajpita; kreskas la abonantaro.
Kultùra agado: funkcias unu tradukrondo, povas kreiĝi pliaj.
Diversaĵoj: P. Degrelle parolas pri IKUE: 6 pliaj abonantoj al EK. Li ne partoprenis la kongreson en Lille, ĉar ne eblis preni decidojn nek voĉdoni pro la foresto de la estraro. En Dalfsen, en 1981, oni decidis pri Nova Testamento, balotado, liturgio, kaj nenio efektiviĝis. Ne eble labori en tiaj kondiĉoj!
S-ro Colas proponas, ke ni daùrigu nian agadon flanke de IKUE. Tamen, ni proponos veran baloton por havi internacian plenumkomitaton.
Venonta kunsido: 20-an de februaro je la 14.00.
17.00: fino de la kunsido per la kanto "Je Vi mi kredas, Di'"

Protokolis: G. Preux.

++

KOLEKTANTO, de Antonina APOLLO

Ne kolektas mi la veturilojn,
nek aliajn nebezonajn ilojn;
ne kolektas mi la troajn vestojn,
nek skulptitajn birdojn, fiŝojn, bestojn;
ne kolektas mi la ornamaĵojn,
nek diversajn tute vanajn aĵojn.
Povas multon kolektadi homo.
Sed en mia silentema domo
staras sur mallarĝaj etaj bretoj
kelkaj plenŝtopitaj skatoletoj.
Kuŝas en skatoloj la trezoroj -
la leteroj de amikoj foraj,
plenaj de allogaj vortoj;
ili skribas pri kaprica sorto,
ke forpasis bone ĉi evento,
ankaù pri la pluvo kaj la vento.
La leteroj strangan forton havas,
ili per la sincereco ravas,
trafluginte la altegan limon
mildan pacon portas en animon.

Mi kolektas ion tre valoran:
de amikoj miaj varmon koran.

14/11/1982

++

RADIO ROMA - ESPERANTO

SANKTA JARO 1983 (teksto de Lo Voi, traduko de De Salvo)

La anonco de la Papo, ke 1983 estas proklamita "Sankta Jaro" por memorigi la 1950-an datrevenon de la Elaĉeto, kaùzis grandan sensacion ĉe la italaj instancoj, kiuj kompetentas pri ekstervicaj turismaj eventoj. La eksterordinara alfluo de pilgrimantoj, kiu okazas ĉe jubileoj, koncernas ne nur la lokajn aùtoritatojn, sed ankaù tiujn naciajn, ĉar la registaro devas antaùzorgi tiujn iniciatojn kaj elspezojn koneksajn kun la fakto, ke Romo estas ĉefurbo de Italio kaj havas reprezentajn taskojn. Koncerne la publikajn kaj privatajn organizojn, kiuj okupiĝas pri turismo, transportoj kaj komerco, la impreso estas, ke ili estis surprizitaj de la anonco, kiu alvenis post la kompletigo de la programoj por 1983.

Okaze de la Sankta Jaro 1975, vizitis Romon (el Italio kaj eksterlando) pli ol 5 milionoj da personoj, kiuj restadis en Romo 12 milionojn da tagnoktoj. Kiom estos la pilgrimantoj en 1983? Certe oni povas antaùvidi, ke kiam (probable en venonta cindromerkredo) Papo Johano Paùlo dua malfermos la "Sanktan Pordon" laù la malnovega rito, komenciĝos jaro tre malfacila por Romo, pro la urbaj kaj trafikaj problemoj, la publika ordo, la efikoj de la ekonomia krizo. Kompense, oni esperas, ke la Jubileo alportos ekonomiajn avantaĝojn, krom tiuj spiritaj.

LA EKLEZIO EN ĈEÑOSLOVAKUJO (teksto de Marino, trad; de De Salvo)

Malfermiĝis nova fazo de strecĉiteco inter la katolika Eklezio kaj la ĉekoslovaka registaro, sekve de la decido de la ĉefepiskopo de Prago, Kardinalo Frantiŝek Tomaŝek, rigore apliki la papan dekreton de marto, kiu malpermesas al sacerdotoj la membriĝon en politikaj movadoj. En tiu kadro, Kard. Tomaŝek postulis la dissolvon de la sacerdota grupo, kiu partoprenas en la movado "Pacem in terris", tre ŝatata de la ĉeñoslovaka registaro.

../...

Post la dua mondmilito, la katolika Eklezio, al kiu aliĝas proksimume 80% el la ĉeñoj kaj el la slovakoj, ĉiam spertis seriozajn malfacilaĵojn. Post la ekpreno de la povo en 1948, la komunista reĝimo tuj kunpuŝiĝis kun la Eklezio, pro la eklezia rifuzo ĵuri fidelecon al la reĝimo. En la jaroj 1950-51 multaj sacerdotoj kaj episkopoj estis enkarcerigitaj. La ĉefepiskopo de Prago, Beran, estis eksigita kaj relegaciita; en 1963 li estis liberigita, sed devis forlasi la landon. La Eklezio kuraĝe eltenis la persekuton, kaj malgraŭ ĉio ĝi daŭre ĉeestas, kiel lumturo de espero kaj de ekzemplo, en la konscienco de la granda plimulto el la ĉeña kaj el la slovaka popolo.

RELIGIO EN ĈINUJO (teksto de Lo Voi, trad. de De Salvo)

Dum la ĵusaj jarfinaj festoj, kaj por la unua fojo post multaj jaroj, religiaj eldonaĵoj kaj bildoj estis videblaj en Sanñajo, kie estas nun eble ankaŭ aĉeti kalendarojn kun kristanaj festoj kaj bondezirajn biletojn por religiaj okazaĵoj. La katolikaj kaj evangeliaj instancoj disvastigas religiajn librojn, antaŭ ĉio la Biblion en ĉina lingvo, eldonita en unu miliono da ekzempleroj. Ĉi tiuj iniciatoj estis favore akceptitaj de la fideluloj de Sanñajo. Oni kalkulas, ke en Ĉinujo vivas kelkaj milionoj da kristanoj.

En Italujo, kaj aparte en Romo, dume oni memorigas la 400-an datrevenon de la alveno al Ĉinujo de la itala jezuito Matteo Ricci, kiu en 1582 eniris tiun foran landon, sekvante la ekzemplon de S-ta Francisko Ksavero, de Marko Polo kaj de kelkaj franciskanaj misiistoj. Patro Ricci estis la unua, kiu sukcesis eniĝi en la kulturon kaj en la socion de Ĉinujo, samtempe diskonigante la filozofion, la sciencon kaj la teñnikon de Eŭropo. Patro Ricci restadis 24 jarojn en suda Ĉinujo, profunde studante la lingvon, la morojn kaj la kutimojn de la loĝantaro. Poste, li translokiĝis en la koron de Ĉinujo kaj en Pekinon, kie li estis favore akceptata de la kleraj medioj kaj povis diskonigi la Evangelion. Dank' al siaj studoj, patro Ricci postlasis 2500 konvertiĝintojn al la fido en Kristo; en la daŭro de nur kelkaj jaroj, la fideluloj iĝis 300 000. Ankaŭ ĉe la nekredantaj Ĉinoj la memoro pri patro Ricci estas tre viva kaj respektoplena.

POPOLA RELIGIEMO (teksto de Cappellani, trad. de De Salvo)

135 dankaj tabuletoj, pentritaj aŭ arĝente ĉizitaj, estas videblaj en la ejoj de la Fondaĵo "Querini-Stampalia" en Venecio, okaze de la ekspozicio "Bildoj de popola devoteco: dankaj objektoj el la napola Sanktejo de la Madono de l' Arkaĵo kaj el la venecia laguno". La ekspozicio, aranĝita de la urba Kultura Departemento en kunlaboro kun la Fondaĵo, daŭros ĝis la fino de januaro.

85 religiaj bildoj venas el Napolo, 50 el diversaj centroj apud Venecio. Ĉiuj verkoj havas komunan inspiriĝon, kvankam la esprimaj rimedoj estas malsamaj: de la plej kruda primitiveco ĝis la plej rafinita (tamen, popola) strebo bildigi dankemon per signoj kaj koloroj. Venecio kaj Napolo havas, de ĉiam, komunan spiritan kapablon intense eksenti kaj esprimi la emociojn kaj la realaĵojn de la ĉiutaga vivo, inkluzive de la religia flanko.

++

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1982

* * *

ENSPEZOJ		ELSPEZOJ	
Kotizoj	3 101,00	Bulteno	2 028,05
Donacoj	760,00	Titolfolioj	1 128,97
Deponoj Ŝparkaso	1 548,14	Korespondado	402,15
Rentumo Ŝparkaso	127,14	Diversaj	992,20
	5 536,28		4 551,37

Pozitiva saldo	984,91
En la kaso la 1/1/1982	3 260,15
En la kaso la 31/12/1982	4 245,06

La kasistino dankas al la afablaj homoj, kiuj donacas iom pli ol la minimuma kotizo; fakte, ĉi tiu apenaŭ kovras la koston de la bulteno! Specialan dankon al la bonfaraj membroj, kiuj tre helpas nian kason; ili laŭeble multiĝu!!

LINGVA ANGULO

La 1-a parto de nia konkurso 1983 ricevis la kontribuaĵojn de 7 ĝelegantoj: G-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (Da), DEGOUL (De), GUILLON (G), MICHAU (M), STANIENDA (S) kaj TEXIER (T). Jen iliaj tradukoj:

1) arrête ton cinéma: ĉesu blufi, for, la komedio (B); haltigu cian klaŭnan montradon (Da); finu viajn montriĝaĵojn (De); ĉesigu vian simuladon (G); ĉesu komedii (aŭ teatri) (M); fermu vian kinon, elŝaltu vian televidilon, ĉesigu vian babiladon (S); mallevu la kurtenon (T).

2) il va en avoir pour un beau sou: tio kostos al li multe da mono (B); li estos surprizita rilate la elspezon (Da); li posedos ion ne tute senvaloran (De); li obtenos sufiĉan kvanton (G); estos sumkoste (M); li multe pagos pro tio (S); li enkadrigos ĉi groŝon (T).

3) il a du crime: lia senĝenateco estas senkompleksa, li estas ja senĝenaĉa (B); li estas sentima, li kutime malbone agas (Da); li jam krimis (De); li estas krimema (G); li aŭdacegas (M); oni kulpigas lin, oni atribuas al li delikton (S); li belas incitige (T).

4) ce n' est pas de mon ressort: mi ne kompetentas pri tio (B, De, G, M); tio ne dependas de mi, tio kuŝas ekster mia kompetenteco (B); tio ne koncernas mian fakon (Da); tio ne koncernas min (S); ne spertas mi (T).

5) ce ne sont pas des enfants de choeur: ili ne estas anĝeloj (B, S); ili ne estas senriproĉaj (B); ili ne estas senpekaj (Da); ili ne estas naivuloj (De, G); ne senspertaj akolitoj (M); ili ne estas senkulpuloj (S); ili finis la trejniĝon (T).

6) cela ne me dit rien qui vaille: suspektinde, suspektinda, tio (B); tio ne valoras por mi (Da); tio supozigas al mi neniun bonaĵon (De); mi tute ne interesiĝas pri tio (G); mi ne konfidas tion, mi aŭguras malbone (M); tio ne plaĉas al mi (S); nebone fontos, malbone direktos (T).

7) qu' à cela ne tienne: ni preterlasu tion, se dependas nur de tio (B); estas nur malgranda detalo (Da); ne malhelpas (De); ne estas grava ĝenaĵo (G); tio ne malhelpu, ni spitu ĝenaĵon (M); ne parolu pri tio, tio ne estas permesebla (S); bagatele (T).

8) bien m' en a pris: bone mi faris (B); senkonscie mi saĝe agis (Da); bonŝance mi decidis (De); mi montriĝis sagaca (G); mi estis taŭge inspirata (M); mi ege ekkoleriĝis (S); pravis por mi (T).

9) as-tu avalé ta langue: ĉu vi englutis vian langon (B, De, M, S); ĉu vi mutiĝis (B, M, S); ĉu ci perdis cian langon (Da); ĉu vi perdis la parolon (De); kial do vi ne parolas (G); li prenis akvon en sia buŝo (S); ĉu vin ŝtopis via P.I.V-o(T).

10) il n' y a pas foule: ne svarmas homamaso,(malmulthome (B); ne estas tro da homoj (Da); ne amase (De); ne estas multaj homoj (G); ne homamase, ne svarmas ĉeestantoj (M); ne estas homamaso, estas malmulte (S); seminario da fantomoj (T).

Kaj jen la unua klasifiko por 1983: 1) en egaleco: S-ro BOURGOIS kajS-ino MICHAU (7); 3) en egaleco: F-ino STANIENDA, S-roj DEGOUL kaj TEXIER; (4); 6) S-ro GUILLON (2); 7) S-ro DAUCHEZ (1).

Tiu partopreno estas jam kontentiga, sed, ju pli da konkursantoj, des pli interesa la ludo kaj la komparo inter la diversaj tradukoj. Prenu vian plumon kaj cerbumu pri la jenaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois:

1) pour le tenir en échec, il faudrait se lever tôt; 2) juger sur pièces; 3) jouer sur du velours; 4) faire des étincelles; 5) obtenir gain de cause; 6) un fou du volant; 7) faire front commun; 8) arriver sans crier gare; 9) faire la une des journaux; 10) se disputer les gros titres.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NIA MEMBRARO

Dumvivaj membroj: 51) S-ro DEGOUL (Seine-St-Denis); 52) S-ro SANSON (Manche)

Bonfarantoj: 2) F-ino ESPRIT (Hte-Marne); 3) F-ino MARTIN (A-M); 4) S-ro BIRON (Italujo); 5) S-ro VERITE (Seine-St-Denis)

Novaj anoj: 1) S-ino CASEY (Usono); 2) S-ro MAILLET (Rhône); 3) S-ino LECORGNE (Moselle); 4) S-ro GRATALOUP (Loire); 5) S-ro COULOT (Ain)

DANKEGON al la unuaj, BONVENON al la lastaj!!

MEMBRARO IKUE 1983

1. DEGOUL F. 2. MAINVIS O.-G. 3. LANCE F.-R.-N. 4. AMINOT M. 5. ROLLAND R. 6. MARAULT F. 7. AUBOSTE S. 8. SCHNEIDER B. 9. THIOLLIERE E. 10. SAUTREUIL B. 11. GOURDON A. 12. MARTIN J. 13. LEGER B. 14.15. VANNEAU-DONACO. 16. AUGEN A. 17. DESPINEY R. 18. PACCOUD J.-L. 19. AMOUROUX J. 20. CHEVERRY B. 21. CUGNY P. 22. JOSSINET R. 23. LECORGNE R. 24. VERNIN L. 25. VERNIN P. 26. GLODE L. 27. CHATELUS P. 28. COLAS R.-C. 29. BARADEL R. 30. VILLENEUVE G. 31. CUVELIER. 32. LECOCQ R. 33. PERDRAUD R. 34. ROYER P. 35. COULOT P. 36. GOUDE M. 37. LEYDER J. 38. FARDET R. 39. PREUX G. 40. REYNAUD P. 41. BIRON L. 42. DOYELLE J. 43. BOURDON L. 44. GOUDE M. 45. SANSON C. 46. PONS R.

Dankon kaj gratulon al ĉiuj, kiuj jam pagis sian abonon por la nuna jaro. Dankegon al ĉiuj, kiuj aldonis donac(et)on al sia abonpago.

Ni finis la antaŭan jaron kun 65 abonantoj, al kiuj aldonendas la dumvivaj membroj. Ĉu ĉijare ni estos pli multaj ol lastjare? Dependas de la enhavo de EK, de la monujo de la katolikaj esperantistoj kaj de nia propra agado: do al via skribilo, al via monujo, al via agado.

Mi atendas viajn diversajn kontribuaĵojn.

Degrelle Roger, IKUE-peranto en Franclando

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

PAPAJ PREĜINTENCOJ

Ĝeneralaj: MARTO: por ke Karesmo estu por la Kristanoj "tempo de vero"
APRILO: por iu pli justa distribuo de la riĉaĵoj kaj de la laboro
MAJO: por ke la kristana familio estu vere kredanta kaj evangelizanta komunaĵo

Misiaj: MARTO: por la respektado de la familiaj kaj religiaj valoroj en Ĉinujo
APRILO: por ke ĉiuj kredantoj sentu sin respondecaj pri la evangelizado en la Eklezio kaj en la mondo
MAJO: por taŭga formado de la seminarianoj kaj novicoj de Azio

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

SUR VIA KALENDARO

BIBLIA SEMAJNFINO: Abatejo Grüssau/Bad Wimpfen apud Heilbronn/stuttgart en Neckar valo, 29/4 ĝis 1/5/83. Temo: Mia kredo en mia ĉiutaga vivo. Prezo: minimuma: 60 DM maximuma: 100 DM laŭ la loĝado. Informas: P. B. Eichkorn, Kolpingstr. 8, D-779 MESSKIRCH.

ESPERANTO-STUDPERIODOJ POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ: dum la tuta jaro Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (Svislando), organizas studperiodojn. La instruado, kiun gvidas Stefano Keller, efektiviĝas laŭ metodiko programita, aŭdvida, pergesta, paroliga kaj legiga. Tiuj studperiodoj daŭras unu semajnon. Studi matene, ferii la reston de la tago en amika etoso, jen io ege riĉiga lingve kaj kulture. Petu la detalajn informilojn de KCE, PF 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds Svislando. Datoj de la venontaj periodoj por komencantoj: aprilo 5/10 - majo 10/15 - julio 17/22 - aŭgusto 7/12 - aŭg. 28/sept. 2 - sept. 18/23 - nov. 8/13 - por progresantoj: marto 22/27 - aprilo 19/24 - junio 21/26 - julio 24/29 - julio 31/aŭg. 5 - aŭg. 14/19 - aŭg. 21/26 - sept. 4/9 - sept. 11/16 - sept. 25/30 - okt 2/7 - okt. 25/30 - nov. 22/27.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Finiĝis jaro kaj denove sumas
mi la rezultojn de pasintaj tagoj:
printempo iam estis. Plu ne zumas
abeloj viglaj ĉe florantaj fragoj.

Somero pasis. Poste en aŭtuno
griziĝis nia ĉirkaŭanta mondo,
ne brilis plu vivige milda suno,
kaj nuboj pendis en malgaja rondo.

Fabela sonĝo - mia promenado -
aspektas kvazaŭ tute ne estinta,
ne eblas al betulo susurado,
arbaro staras nuda, estingiĝinta.

Alvenas la mateno tre malfrue,
finiĝis por naturo gaja festo,
malvarma vento furiozas brue,
disŝiras pacan maron la tempesto.

Diveni provas mi la estontecon,
sed imagpovo estas tro malforta,
ĉirkaŭe vidas mi nur malplenecon
kaj senesperan lukton kun la sorto.

Ĝis nun feliĉon trovis mi nenie,
aerkasteloj venas - por perei,
ekzistas tamen la beleco ĉie,
ankoraŭ povas vidi mi kaj krei.

Antonina APOLLO
Tallinn, 9/1/83

NOVA KANONJURA KODO (teksto de Cappellani, trad. De Salvo)

Eldonita de Papo Johano-Paùlo dua la 25/1/83, la nova kanonjura kodo celas al la baza principo traduki en precizajn jurajn regulojn la ŝanĝojn deciditajn de la Katolika Eklezio per la dua Vatikana Koncilio. La Papo, kiu donis la lastajn tuŝojn al la nova kodo, parolis pri "historia evento", kaj aldonis, ke la postuloj juĝos ĉi tiun leĝaron, en kies redaktado partoprenis dum preskaù 20 jaroj katolikoj el 31 landoj. La nova kodo, kiu anstataùas tiun eldonitan de Papo Benedikto 15-a en 1917, malfermiĝas al la postuloj de la nuntempa socio, kaj celas interpreti fidele la spiriton de ekumena renoviĝo de la dua Vatikana Koncilio.

Nova regulo preskribas egalecon inter klerikoj kaj laikoj koncerne rajtojn kaj devojn. Laikoj alprenos rimarkindajn funkciojn en la eklezia organizo. Virinoj rajtos iĝi eklezia juĝisto, episkopa kanceliero, celebranto de geedziĝo, prizorganto de funebra ceremonio, eĉ administranto de paroĥejo sen sacerdoto. Gelaikoj povos fari ĉion, escepte de mescelebrado kaj konfespreno. Sacerdotoj ne povos plenumi publikajn funkciojn, nek aktive partopreni en politikaj partioj nek estri sindikatojn.

Pli simpla estas la regularo pri geedziĝoj: oni aboliciis la malpermeson je geedziĝo inter duagradaj gekuzoj, inter anoj de diversaj religioj; oni plivastigis la eblecojn je nuligo de geedziĝo. Krome, dum la antaùa kodo asertis, ke la ĉefa celo de geedziĝo estas la generado, la nova mli multe emfazas la personecajn aspektojn de la geedza rilato. La kazoj de ekskomunikado estas malpliigitaj de 42 al 9. La ĝisnuna sistemo, kiu antaùvidis apartajn kasojn por ĉiu paroĥo, estas forigita: estos kreita komuna kaso por ĉiu diocezo.

++

INSTRUKCIOJ POR LA BALOTADO: enŝovu la voĉdonilon en koverton kun indiko "Voĉdonado FKEA". Tiun sigelitan koverton enmetu en alian sendotan al la sekretario antaù la 25-a de marto. Dorsflanke de ĉi tiu lasta koverto, skribu vian nomon.

==========

RAJTIGILO

sendota al la sekretario antaù la 25-a de marto se vi ne partoprenos la pilgrimon

Mi subskribinte (kompleta nomo)
ne povante partopreni la pilgrimon en Lourdes, rajtigas
voĉdoni je mia nomo por ĉiuj decidoj favoraj al FKEA.

Antaù ol subskribi, aldonu permane "Bon pour pouvoir"

Dato kaj subskribo:

VOĈDONILO

vidu la instrukciojn ĉi supre.

Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Vi rajtas modifi la liston, kondiĉe, ke restu nur kvar nomoj.

S-ro LAFARGUE Henri (Nantes)

S-ino MICHAU Jeanne (Orléans)

F-ino PREUX Georgette (Lille)

S-ino VINCENT Jeannine (Baugé)

KOTIZTABELO 1983

IKUE kun "Espero Katolika"	60 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.	

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto"	20 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj	10 F
Bonfarantoj	100 F
Dumvivaj membroj	400 F

UFE kun "Revue Française"	145 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro	175 F

Abono al "Biblia Revuo"	40 F

Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

++

ENHAVO

1.2. Bileto de la Prezidanto
2. Popolo de l' Universo
2.3. Protokolo de la komitatkunsido de nov.
3. Kolektanto (A. Apollo)
3.4. Radio-Roma
4. Financa raporto
5. Lingva angulo
5. Nia membraro
6. Membraro IKUE
6. Sur via kalendaro
6. Poemo (A. Apollo)
7. Nova kanonjura kodo
7. Administra angulo
8. Kotiztabelo 1983

++

Dépôt légal: 1er trimestre 1983

C. P. P. nº 62 532

Directeur-gérant: Roger Despiney

!! Polycopié par l' Ass. C. F. E.
!! Prieuré St-Martin
!! La Houssaye-en-Brie
!! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE